



# PENSEO

N-ro 207

jan. / 2009

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Vejdo

### Ĉe Sojlo de la Jaro 2009

La nova jar' gravedas je espero,  
malgraŭ ekonomia agonio.

Jam sonas la homara batalkrio  
por sin elsavi glate el danĝero.

Lastjare regis multe da sufero:  
milito, katastrofoj, inflacio.

La nova jar' gravedas je espero,  
malgraŭ ekonomia agonio.

Per unuvola solidar' de fero,  
popoloj mondaj strebu kun racio,  
laboru kune sen ajn fantazio  
por fina venko super bariero.

La nova jar' gravedas je espero.

kune vojaĝis kun verdstela flago,  
sub gvido de loka samideano.

Post kuro sur aŭtovoja sinuo,  
ni venas al tombej' de Verda Majo.  
Malproksime for de la urba bruoj.  
Etoso plena de sankta malgajo.

Pluveto disŝutiĝas el ĉielo.  
Funebras koincide tri minutojn.  
Kaj ni al la Hejmsopira Stelo,  
omaĝas florojn kaj korajn salutojn.

Vivu vi geedzoj kun aŭreolo  
ĉiam en koro de ĉina popolo!



(2008-05-19)

## Guozhu

### Vizito al la Tombejo de Verda Majo

Post majkongreso, en funebra tago,  
pie esperantista karavano,

## Ĉineske

### Ardo

### Jarfine

—laŭ ĉinesko Huanxisha\*  
Alternis la sezonoj

jam pasis jar' sen tono  
mi vivas sen la krono

Novjaro baldaŭ venos  
mi volos fari bonon  
sed ĉasos sen redonon

*\*Huanxiha: ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj, laŭ rimaranĝo aaa,xaa (x = senrima)*

## Guozhu

### Jarkunveno de HEA 2008

— laŭ ĉinesko Niannujiao (Ĉarma Kantistino)\*

Jarfine en  
decembro  
sub Zamenhof-beno,  
laŭkutime  
okazis  
nia jarkunveno.  
La Espero.  
Verda flago.  
Raport-bulteno.  
Kunfotiĝo  
en festa soleno.

Daŭrigo plezura.  
Al Ruĝa Klifo  
je fampleno!  
Granda halo:  
Du Odoj!  
Poezia sceno.  
Pli allogas  
kultura ĝuo  
ol festeno.  
Je disiĝo  
sopir' pri reveno!

*\* Niannujiao (Ĉarma Kantistino): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj el 22 versoj de 436, 436, 445, 46/654, 436, 454, 46 silaboj, kun rimarango xxa, xxa, xxa, xa/xxa, xxa, xxa, xa (x=senrima).*

## Miĉino

### Lito

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling\*

Lito, lito,  
al ripoz' invito.  
Dormu dolĉe, bone,  
belsonĝu festone!  
Nesto, nesto,  
de ora tempresto

## Vejdo

### Kristnasko ĉe Krizo

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

ĝojfest'  
krizpest'  
mondon trafas molest'  
prezroj altas leve  
vivo mavas kreve  
vere, vere  
iras fest' mizere

*\* Tiaoxiaoling (flirta kanto) ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4,6; 6,6; 4,6 silaboj, laŭ rimarango de aAabbcCc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvina verso, ekz. rimi-miri; (m)oki-kio.*

## Mao Zedong (1893-1976)

### Responde al Kamarado Guo Moruo

—laŭ ĉinesko Manjianghong\*

Sur terglobet'  
kelk muŝoj  
kontraŭ la mur'  
sin frapas  
kun ploranta  
trista murmur',  
kvazaŭ formikoj blufas  
pri skuad' de trunka dur'.  
En vento

falas folioj  
kun susur'.

Ĉiaĵo  
dum tempkur'  
ŝanĝiĝas  
sen mezur'.  
Jarmil' tro longas,  
gravas tuj' nur.  
Tumultas maroj monde,  
vipas ŝtormo kun tortur' .  
Ekstermu  
ĉiujn fiulojn  
per sangĵur'.

*\*Manjianghong: ĉina fiksforna poemo el du strofoj  
po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353  
silabj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa  
(x=senrima)*

Elĉinigiŝ **Veĵdo**

## Veĵdo

### Funebre pri Io Chou\*

—laŭ ĉinesko Taoyuan Yiguren\*\*

bela granda papili'  
falas sen energi'  
malsupren pli kaj pli  
teren sen vekri'

ankoraŭ kun emoci'  
transmonde pene vi  
jen okupiĝas pri  
entomologi'

*\*Io Chou, ĉina fama entomologo, esperantistiĝis en  
1926.*

*\*\*Taoyuan Yiguren: ĉina fiksforna poemo el du  
strofoj po kvar versoj de 7,6,6,5 silaboj, laŭ  
rimaranĝo aaaa*

## Eto

### Falanta Folio en Vento

—laŭ ĉinesko Rumengling\*  
la falanta foli'

drivas el famili'  
l' arba forvage  
en venta melodi'  
sen sci'  
sen sci'  
pri la onta medi'

*\*Rumengling: ĉina fiksforna poemo el sep versoj de  
6,6,56,2,2,6, laŭ rimaranĝo aa,xa,a, Aa (x=senrima)*

## Lily

### Embaraso en Buso

—laŭ ĉinesko Yulinling\*

per veturo  
kuras buso  
kun plezuro  
pasaĝeroj skuas  
korp' al korpo  
la murmuro  
tradenta eksonis  
kvazaŭ amĵuro  
subite  
mi eksentis  
jen ĉe mia femuro

tuŝon de kaca duro  
brulantan  
de virfiguro  
ekis froto supren  
malsupren  
sen mezuro  
varma ĵeto  
suka  
defluis laŭ l' kruro  
hasteme  
mi min turnis  
ba! blanka ĉuro

*\*Yulinling: ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun 11  
kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,  
426,345 laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,  
xxa,xxa (x=senrima)*



## Sam

**Ĉielarko**

—laŭ ĉnesko Daoliansi\*  
 ĉielark’  
 la ponto  
 sepkolora ĉe monto  
 alte pendas impone  
 en bela duonrondo

## Sero

**Perdita Amo**

—laŭ ĉinesko Chaitoufeng\*  
 invita  
 incita  
 amkuniĝo perdita  
 amo por  
 litalabor’  
 kaj korppluiĝ’  
 kun pia kor’  
 for  
 for  
 for  
 ekscita  
 surlita  
 amludo forgesita  
 ĝojdolor’  
 en amor’  
 jam foriĝis  
 disde fervor’  
 sor  
 sor  
 sor

\*Chaitoufeng: ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1\*, 1\* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.



## Zhuang Qixiong

**Omaĝe al Zamenhofa Festo**

—laŭ ĉinesko Hexinlang\*  
 Kun emocio  
 ni festu  
 grandan tagon  
 laŭ racio.  
 La talenta Zamenhof  
 —lingva utopio?  
 Per paca ambicio;  
 Por homara frateco  
 kaj socia harmonio.  
 Plej glora  
 defio!



La poeta genio  
 instigos  
 nin al nova  
 historio.  
 Kreu la riĉajn verkojn  
 en ĉineska krio  
 laŭ tempa  
 melodio!  
 Skribu la artikolojn  
 kun anima energio  
 kaj brila  
 magio!



Eldonas Redakcio de **Penseo**  
 Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)  
 Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo  
 de No. 19, Wujiang St.,  
 Jiangbei Distrikto,  
 Chongqing, 400020, Ĉinio  
 Tel: (023) 67095890 (hejme)  
 Poŝtadreso: vejdo@163.com  
 Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.  
 Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin  
 turnu al [www.eterno.cn/penlisto.htm](http://www.eterno.cn/penlisto.htm)

